



Ĉu ...?

Trapasu la KER-ekzamenojn de UEA-ITK

Ĉu ankaŭ vi deziras pruvi per oficiala ŝtata diplomo vian lingvoscion pri Esperanto ?

Ĉu vi scias ke en Hungario jare plurmil homoj ekzameniĝas pri Esperanto kaj uzas la akiritan atestilon por havi avantaĝojn en siaj studoj kaj laboro?

Ĉu entute vi scias kiunivele vi konas nian lingvon ?

UEA kunlabore kun la hungara ekzamencentro, aneksita al la prestiĝa budapeŝta Universitato Eötvös Loránd funkciigas novan ekzamensistemon, laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo.

Institucio

La novaj ekzamenoj nun estas ellaboritaj en **nivele B1 (komencintoj), B2 (mezniveluloj) kaj C1 (progresantoj)**. Mem la atestilo estas impona, oficiala dokumento, verkita en 4 lingvoj (en Esperanto, angla, germana kaj franca).

La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la oficiale rekonataj fremdaj lingvoj.

Nia hungara partnero ITK estas plenrajta membro de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo [ALTE](http://www.alte.eu).

Informoj

Detalajn informojn vi povas elŭti en la paĝaro <http://edukado.net/ekzamenoj/ker>

En la sekcio [PRISKRIBOJ](#) vi povas legi la detalan prezenton pri la postuloj kaj strukturo de la ekzameno.

Vi certe rimarkos, ke kompare kun la malnova ILEI-UEA-ekzamenoj en la KER-ekzameno nur en la parola parto estas kelkaj demandoj traktantaj la movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto, la skriba parto ne entenas tiajn taskojn.

Por interesuloj ni aparte konsilas mendi ĉe UEA la eldonaĵon [Esperanto de nivelo al nivelo](#), kiu entenas ĉiujn necesajn informojn kaj seriojn de specimenoj je ĉiu nivelo de la ekzamensistemo.

Prezoj

Bazaj prezoj:

68 (B1)-74 (B2)-84 (C1) eŭroj

Por landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Irlando, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Svedio, vislando kaj Usono.

A-landoj: 44(B1)-48(B2)-54(C1) eŭroj

Ĉeĥio, Estonio, Honkongo, Hungario, Israelo, Kipro, Korea Respubliko, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sud-Afriko kaj Tajvano

B-landoj:

34(B1)-38(B2)-42(C1) eŭroj

Argentino, Brazilo, Ĉinio, Rusio kaj ĉiuj supre ne listigitaj landoj.



Sesioj

Por la sekva periodo ni jam planis kelkajn sesiojn.

2014

- 25 januaro : Antverpeno (Belgio)
- 24-28 januaro: Florianopolo (Brazilo)
- 2-4 majo: Ronda (Hispanio) – Greziljono (Francio)
- 17 majo : Tutmonda Ekzameno
- 6-9 junio: Erfurt (Germanio)
- 1 aŭgusto : Bonaero, Argentino, UK

Aliĝilo al la sesioj :

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Organizantoj de grandaj eventoj kaj renkontiĝoj, interesataj kunokazigi sesiojn, kontaktu [Katalin Kováts](#).

Intervjuo pri la KER-ekzamenoj



Inter 2009 kaj komenco de 2014 jam **1346 esperantistoj el pli ol 60 landoj** trapasis la ekzamenon .

Se ankaŭ vi volas trapasi la novajn KER-ekzamenojn, petu informojn pri la sekvaj sesioj ĉe [UEA](#) aŭ rekte de Katalin Kováts, je la adreso ker-ekzamenoj@edukado.net